# La Blanka Rozo

Revuo de la
**FEDERACIO ESPERANTISTA DE YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE**

**N-ro 276** **PRINTEMPO 2017**


## NOVA POSTENO ĈE E.A.B.

Ĉu vi vidis la reklamon kaj formularon? Ilin oni anoncis la 6-an de januaro, kun limdato la 23-a – do nur du semajnoj por prepari sin por kandidatiĝi por fari preskaŭ ĉion en la asocio. La originala teksto nun malaperis post la limdato (prokrastita laŭ mia instigo ĝis la 30-a de januaro), kaj restas nur draste reduktita kaj ĝentiligita versio de nur la enkonduka teksto..

La originalo estis spirraba pro la akra, defia, eĉ minaca tono dise en la formularo kaj la vasta gamo de postulataj agadoj. La enpostenigito 'sendepende' zorgu pri multo, kion normale farus sekretario kaj kasisto de bonfara asocio, pri evoluigo de retpaĝoj, pri publico, pri edukado, pri la biblioteko, pri financaj aferoj, pri raportado al Charities Commission, kaj eĉ kontrolu la laboron de la oficeja stabano… Interese mankis io eksplicita pri membrovarbado!

Retmesaĝe mi funde diskutis la aferon kun la prezidanto, Ian Carter. Li ĉiam ĝentile kaj kompreneme respondis, klarigante iujn aspektojn – ekzemple, ke la 'sendependeco' ne estas absoluta, sed ene de limoj difinotaj de la estraro; ke la financaj aferoj estas nur 'rutinaĵoj', kiel plenskribado de dokumentoj, sed ne temas pri gravaj decidoj – tiujn faru la oficiala kasisto; ke la estraro intencas mendi konsilojn de ekstera bibilioteka spertulo; ktp. Mi proponis, ke estus pli bone varbi du aŭ tri personojn, ĉiu kun propraj specialiĝoj, sed leviĝis praktikaj argumentoj kontraŭ tio…

Responde al miaj demandoj pri la postenpriskribo, Ian konfirmis, ke Paul Gubbins, tiama prezidanto de EAB, konsideris 'pagatan rolon' en 2015. Mi scias tamen, ke lia ideo estis rekrei rolon pli similan al tiu de David Kelso, certe ne tiom grandan kiel la nunan. Ian bonkore sendis al mi eltiraĵojn el la protokoloj. Ili nur pli nebuligis la aferon por mi: ne ekzistas protokolo de la kunsido, kiam oni provis difini la taskaron! Tiu estis la lasta kunveno, kiun partoprenis la du Paŭloj, Gubbins kaj Dennett. Do laŭ mi la sekvaj diskutoj ne validas, ĉar ili estis ne kvorumaj. Ian klarigis, ke malgraŭ la mankanta protokolo, la restantaj tri estraranoj bonege memoris la enhavon de tiu kunsido kaj laŭe agis poste; ke kvankam nur tri homoj ellaboris la finan version de la taskaro, kvara estrarano aliĝis por fari la decidon. Tiu kvara estis ekskludita el la antaŭaj kunsidoj pro eventuala intereso en la rezulto – laŭ mi tio same senrajtigas ties decidopovon. Ian tiam proponis, ke ni konsentu malkonsenti – kion mi jesis. Sed do kial la estraro ne strebis tuj alelekti pliajn komitatanojn por 'kvorumiĝi'…?

Laŭ *Update* de la pasinta januaro Tim Owen interesiĝas pri ia pagata rolo, kaj ŝajne li estas la nun atendata kandidato. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu li aŭ iu alia kandidatis, ĉu la estraro jam faris ian decidon. Mi ne kontraŭas Tim persone, mi bone kunlaboris kun li ene de NoJEF kaj ĉe la Barlastonaj kursoj, mi admiras liajn entuziasmon kaj diversajn kapablojn - aparte pri modernaj teknikaĵoj - sed min mirigas, ke la proponata rolo (kontraste al la antaŭa, kiun okupis David Kelso) estas tiom vasta, kun tiom da diversaj kapablopostuloj.

Mi timas unue, ke unu persono ne kapablos ĉion bone plenumi, kaj due, ke la asocio perdos, ĉar ĉio estos en la cerbo de unu persono. Ĉu ne estus pli bone dividi la taskojn inter pluraj personoj? Se tiu unuopulo malsanos aŭ ŝanĝos sian intencon, ni perdos la tutan korbon kun ĉiuj ovoj...

*Malcolm Jones*

# Muriel Shackleton † 1928-2016



Ni tre bedaŭras la morton, je la 26a de novembro en flegejo en Bradford, de nia kara samideanino Muriel Shackleton.

Ŝi naskiĝis - kiel Muriel Gill - en Wibsey apud Bradford. Kvankam lerta, ŝi devis forlasi la lernejon kun dek kvar jaroj. Laborante tage ĉe teksaĵentrepreno, vespere ŝi studis stenografion, librotenado kaj tajpado. Post ladua mondmilito revenis soldatoj por repreni siajn postenojn, do Muriel perdis la sian. Poste ŝi laboris ĉe Lancasters, firmao kiu liveris aŭtomatojn al amuzejoj, ĝis 1965, atinginte la rangon de oficejestro. Ĉirkaŭ 1950 ŝi ekinteresiĝis pri Esperanto. Ĉe kunvenoj regis formala etoso, sen antaŭnomoj; pli aĝaj kaj spertaj homoj gvidis aferojn. Tamen ili sufiĉe respektis ŝin por alparoli ŝin kiel 'samideanino Gill.' Inter ŝiaj amikinoj estis Audrey Duerden, kaj ili ambaŭ helpis organizi la UK-on en Harrogate in 1961.

Muriel aktivis en la Jorkŝira Federacio, deĵorante kiel protokolisto, sekretario kaj prezidanto; kaj dum jardekoj ŝi gvidis la bradfordan lokan grupon. Ŝi forte subtenis *La Blankan Rozon.* Ekde aŭtuno 1978 la arkivoj montras raportojn de 'MoSo' en preskaŭ ĉiu numero. Ekde 1995 aperis ankaŭ artikoloj, vortenigmoj, poemoj kaj desegnoj de la kamparo.

La kamparon Muriel ja ŝatis, piedvagante kaj tranoktante en junulgastejoj. Tiel ŝi renkontis sian estontan edzon. Vojaĝado kaj la naturo estis ŝiaj ĉefaj ŝatokupoj kaj provizis la fonon de ŝiaj artikoloj kaj poemoj. Krome ŝi ĉeestis kursojn pri desegnado kaj pentrado, angla literaturo kaj loka historio. Dum pluraj jaroj ŝi redaktis la bultenon de la Jorkŝira Dialekto-Asocio. En 2016, antaŭ ol malsaniĝi, ŝi verkis dialektan poemon pri siaj memoroj de Wibsey.

David Kelso prave priskribis Muriel-on kiel 'modela dumviva lernanto.' Ankaŭ pro ŝia dumviva entuziasmo, kaj kapablo vigligi aliulojn, ŝi ege mankos al ni. Ni kondolencas edzinon Ernest, filinon Mary, familianojn kaj amikojn.

*Jack Warren*

## *Jen memoroj pri Muriel de niaj legantoj . . .*

Mi memoras kun malĝojo kaj kun plezuro mian amikinon Muriel Shackleton. Mi ne konis iun kiam ni translokiĝis al Bradford en 1999. Jam lerninte iom da Esperanto, dum mia unua semajno en tiu urbo mi telefonis al Muriel, trovinte ŝian numeron en la jarlibro. Ŝi respondis tute bonvenige kaj varme, kaj ne nur informis min pri la E-grupo en Bradford sed ankaŭ pri la Antikvaĵista Societo, per kiu mi renkontis multajn aliajn novajn amikojn.

Antaŭ 18 jaroj la bradforda E-grupo kunvenis ne ofte sed regule. Muriel aranĝis la programon, elsendis ĝin kaj prizorgis la kunvenojn. Ĉiam ŝi havis ideojn pri paroltemoj aŭ ludoj. Aŭ ŝi proponis interesajn temojn por la konversacia rondoj, aŭ ni legis nian romanon *Forkaptita*, dum Muriel atente korektis nian prononcadon. Si kuraĝigis nin ĉiujn; foje pli ol ok personoj ĉeestis, kunvenante en la domo de alia nun forpasinta amikino, Audrey Duerden.

*(daŭrigata sur paĝo 3)*

*(daŭrigata de paĝo 2)*

Kiam la kunvenoj okazis pli malofte, Muriel instigis 'rondiranton' per kiu la partoprenantoj skribis iun artikoleton, aldonante ĝin al la artikoletoj de la aliuloj, kaj sendis ĝin al la sekvanta persono en la listo, kaj kiam oni recevis sian propran artikoleton denove, oni forĵetis ĝin kaj anstaŭigis alian artikoleton. Bona ekzerco!

Eĉ post kiam mi forlasis Bradford por Lichfield en 2007 mi kutimis reiri 'hejmen' semajnfine ĉar ni retenis nian domon tie. Do mi povis daŭre ĉeesti lokajn kunvenojn kaj partopreni federaciajn kunvenojn kiam Audrey veturigis Muriel kaj min al Thirsk, York aŭ Sheffield. La bradforda E-grupo ŝrumpis sed mi scias, ke Muriel daŭre legis kaj skribis en la internacia lingvo, eble pri siaj ekskursoj en la jorkŝira pejzaĝo, kiun ŝi ja amis.

Mi ĉiam ĝojis vidi Muriel. Ŝia entuziasmo, flueco kaj vigleco estis fonto de inspiro por mi kaj mi enkore memoras ŝin kaj dankas ŝin pro ĉio, kion ŝi malavare donis al Esperantujo.

*Anne George*

Muriel estis ĉiam afabla kunparolantino. Mi iom ofte renkontis ŝin - kaj Audrey - kiam mi estis ankoraŭ 'suda' esperantisto en la 1980-aj jaroj: kiel ili, mi regule ĉeestis diversajn kunsidojn en Londono - komitatajn kaj tiujn de la 'konsila komisiono'. Jam tiam mi aŭdis pri la jamaj spertoj de la du jorkŝiraninoj, kiuj - foje vojaĝante bicikle - partoprenis kaj kunorganizis federaciajn, naciajn kaj internaciajn renkontiĝojn.

Reveninte al Skipton mi povis pli ofte ĉeesti lokajn kaj federaciajn eventojn dise en la regiono. Muriel regule ĉeestis, sed ne, se la dato koliziis kun alia pasio ŝia: ŝi estis fervora fleganto de la jorkŝira dialekto, ĉeestante ankaŭ por tio societajn kunvenojn. Ŝi parolis Esperanton ĉiam kun agrabla, rekonebla akĉento, kiu ŝajne ne malhelpis ŝian komunikadon kun alilandanoj - ŝi ĝuis multjarajn internaciajn amikecojn.

Foje ŝi sendis al mi fotojn pri eventoj, kiujn mi ĉeestis, kaj mi havas do belajn memoraĵojn pri kunvenoj en Keighley, Bradford kaj Barlaston danke al ŝia bonvolemo, kaj do belajn memorojn pri Muriel mem.

*Malcolm Jones*

Mia plej bela memoraĵo pri Muriel estas el la jaro 2005 kiam ŝi estis en grupeto da Jorkŝiranoj kiuj vojaĝis al Bulonjo ĉe maro por ĉeesti la centan datrevenon de la unua Universala Kongreso en tiu bela Franca marbordurbo. La grupeto konsistis el mi, Muriel kaj ŝia multjara amikino Audrey Duerden ankaŭ el Bradford. En Londono Martyn McClelland aliĝis al nia grupeto kaj ni vojaĝis kune kaj kvarope de tie.

Mi aranĝis taŭgan vagonaron al Londono kaj denove la Eurostar de Londono al Kalezo (Calais Frethun) kie ni devis ŝanĝi al loka vagonaro laŭmarborda al Bulonjo. Ni ĉiuj mendis ĉe la sama hotelo do pasigis multe da tempo kune dum la vojaĝo kaj ĉe la manĝejo. Pro tio mi pli bone konatiĝis kaj kun Audrey kaj kun Muriel kaj ĝojis ke mi havis la plezuron de du tre agrablaj kaj lertaj Esperantistoj por inteligenta konversacio. Malgraŭ mia lernejana Franca mi parolis pli bone ol la aliaj, do trovis min kiel interpretiston en multaj lokoj.

Ni ĉiuj tre ĝuis la unikan kongreson kaj ĉio iris glate kaj senprobleme. Muriel aparte ĝuis la aferon ĉar lastatempe ŝi ne povis multe vojaĝi eksterlanden kaj estis tre dankema pro mia kontribuo. Post alveno hejmen ŝi preparis specialan memorlibron kun bildkartoj kaj fotoj inter la teksto kiu estis tre profesie farita. Feliĉaj memoroj pri ambaŭ el ili!

*Geoffrey Wood*

**LA 101a UNIVERSALA KONGRESO EN NITRA, SLOVAKIO**

Pasintjare la UK okazis en Slovakio por la unua fojo, tamen por mi estis la 24a fojo ĉe UK. Mi ja estas nun veterano! Tamen ankaŭ por mi estis unuafojaj okazoj – mia unua vizito al Slovakio, unua flugo per Ryanair kaj unua flugo de Stansted, kiu estas facile atingebla de Wakefield per vagonaro kun nur unu ŝanĝo en Peterborough. Mi flugis al Bratislavo, la ĉefurbo de Slovakio, sed devis tranokti tie pro malfrua alveno. Kvankam Bratislavo estas internacia flughaveno (eĉ se malgranda) ege surprizis min ke ne ekzistas tie valutŝanĝejo. Feliĉe mi havis jam grandan stokon da eŭroj. La sekvantan matenon mi daŭrigis mian vojaĝon al Nitra per aŭtobuso kaj alvenis post malpli ol du horoj.

Aliĝis al la kongreso preskaŭ 1300 homoj el ĉirkaŭ 60 landoj sed estis nur ĉirkaŭ 30 el Britio kaj laŭ mia memoro mi estis la sola jorkŝirano. La kongresejo estis kolegio apud la urbo-centro, rande de granda parko sed ne sufiĉe granda por la Solenaj Inaŭguro kaj Fermo. Ni devis vojaĝi al granda sporthalo ĉe la urborando por tiuj eventoj sed oni provizis aŭtobusaron, do ne estis problemo atingi ĝin. Notindaĵo ĉe la Inaŭguro estis la ĉeesto de almenaŭ tri ambasadoroj; kaj la urbestro bonvenigis nin en flua Esperanto kaj faris prelegon en ĝi!

La kongreso sekvis la kutiman formaton sed mi partoprenis multajn ekskursojn kaj sekve maltrafis interesajn prelegojn. Tamen dum la ekskursoj mi multe babilis kun samekskursanoj diverslandaj kaj tiel parolis pli ol mi farus dum prelegoj! Granda malkontentiĝo por mi estis, ke mi maltrafis la Nacian Vesperon, ne pro foresto, sed ĉar ĝi okazis eksterdome en la urba placo sen ia ebleco sidiĝi, kaj mi ne povis staradi dum tiel longa tempo post jam tre okupita tago.

Dum la tuta semajno mi ekskursis kaj post la fino de la kongreso mi partoprenis la postkongreson ĉirkaŭ Slovakio dum ses tagoj. La du lastajn tagojn ni pasigis en Bratislavo kaj tranoktis en luksa riverboato ĉe la Rivero Danubo. Dum mia estado mi vizitis multajn belajn urbojn kaj vilaĝojn kun belegaj preĝejoj, kasteloj kaj domegoj, belan pejzaĝon kaj la ĉefurbon. Resume mi povas rekomendi Slovakion kiel bonan feriejon ĉar estas tiom por fari kaj vidi kaj la prezoj estas tre favoraj por ni el Britio. Mi revenis kun tre pozitivajn impresojn pri la lando kaj volonte revizitus ĝin.

*Geoffrey Wood*

---

## PAROLSINTEZILO REGAS LA JORKŜIRAN

Profesoro Stephen Hawking estas tre konata, ne nur kiel fizikisto, sed ankaŭ pro lia dumviva lukto kontraŭ movneŭrona malsano. Aŭdante lian voĉon por la unua fojo per parolsintezilo, lia edzino surpriziĝis. "Ĝi estas usona!" ŝi diris. (Do, almenaŭ en la filmo tio okazas.)

Jason Rise el la vilaĝeto Rise - inter Beverley kaj Hornsea enOrientjorkŝiro - ankaŭ suferas pro tiu malsano kaj nun bezonas parolsintezilon - sed ĉi-foje ĝi parolos jorkŝire. Sciencistoj ĉe la Universitato de Edinburgo ellaboris por Jason voĉbankon el malnova vidbendo lia. Krome ili uzis la voĉojn de lokaj volontuloj por pligrandigi la stokon de surbendigitaj vortoj.


"Mi ŝatus reteni certan identecon," diris Jason. "Mi ne volas esti nur voĉo programita el komputilo. Tiu estos multe pli bona, ĉar ĝi ja estas mia voĉo."

*Sproto*

## POEZIO EL MIDDLESBROUGH!

Poemoj de Margaret Williams jam aperis en tiu revuo. Nun eldoniĝis nova dulingva kolekto de ŝiaj verkoj. Angla originalo staras sur ĉiu dekstra paĝo, kun traduko esperanten maldekstre.

La poemoj pritraktas diversajn temojn, i.a. la rolon de la naturo en kamparo kaj urbo, kaj kiel ankriĝi meze de ŝanĝado.




*Within a Still Eye / En Senmova Centro* haveblas kontraŭ £5 ĉe la printempa kunveno en York kaj ĉe la librobudo de la Brita Kongreso en Edinburgo.

*Jack Warren*

---

## *Por via taglibro*

Marto 4 **Federacia Jarkunveno** en York - vidu supre

13 Skiptona E-grupo kunvenas - vidu la *MeetUp*-paĝon

Majo 6 NOEF-kunveno, Preston

Junio 24 Federacia Ekskursotago al Kastelmuzeo, York

10-12 Skota Kongreso, Glasgovo

Julio 22-29 **Universala Kongreso,** Seulo, Koreio

## FEDERACIA KUNVENO EN YORK

**La printempa kunveno okazos je sabato la 4a de marto 2017, je 13 30 ptm ĉe la klubo Guppy's Enterprise Club, 17 Nunnery Lane. Manĝetoj kaj trinkaĵoj estos aĉeteblaj, aŭ kunportu varman trinkaĵon.**

**TAGORDO**

| | |
|---|---|
| 13 30 | **Jarkunveno:** |
| | Bonvenigo |
| | Pardonpetoj |
| | Protokolo kaj akcepto |
| | Aferoj leviĝantaj |
| | Financa raporto |
| | Elektoj de novaj oficantoj |
| | **Printempa kunveno:** |
| | Protokolo kaj akcepto |
| | Aferoj leviĝantaj |
| | Venontaj kunvenoj |
| | *Blanka Rozo* |
| | Aliaj aferoj |
| | Konversacia rondo |
| 15 30 | Adiaŭa teo kaj kafo |
| 16 00 | Fino |

---

## PRI GREZILJONO

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj dum ĉiuj sezonoj, kun E-kursoj kaj aliaj aktivaĵoj:

5-9 aprilo □ Korusa staĝo de Interkant'. Detaloj en gresillon.org/koruso

14-22 aprilo □ **AMO PRINTEMPaS**: intensivaj kursoj, internaciaj ekzamenoj, AMO-seminario. Detaloj en gresillon.org/p

Julio: □ Scio-interŝanĝoj, Alternativa semajno, Kiam ci ŝatus partopreni por lerni , aktivi aŭ prezenti ion?

Aŭgusto: □Infana- Familia semajno, Pupteatro. Kiam vi volus ĉeesti por ludi , lerni aŭ proponi ion?

Kontaktu nin al kastelo@gresillon.org.

# VORTŜTUPETARO

Komencu malsupre kaj montu la ŝtupetaron per helpo de la indikiloj, ŝanĝante ĉiufoje nur unu literon el kvarlitera radiko, por atingi la supran vorton.

| | | F E L T O |
|---|---|---|
| 11. | Sulketo sur vizaĝo | ________ |
| 10. | Rabobirdo | ________ |
| 9. | En tuko aŭ papero | ________ |
| 8. | Troviĝas en konto | ________ |
| 7. | Fiŝo | ________ |
| 6. | Moviĝo enaeren | ________ |
| 5. | Greno por biero | ________ |
| 4. | El Litovio, ekzemple | ________ |
| 3. | Fibro por fari korbojn | ________ |
| 2. | Socia klaso | ________ |
| 1. | El aro de 52, por ludi | ________ |
| | | K A N T O |

## *Solvo por' Vortrado'*

Aldo, damo, darmo, dermo, devo, dolo, dolora, domo, dormo, dramo, drola, lardo, ledo, levado, lodo, lordo, mardo, medo, merdo, modo, modalo, modelo, mordo, movado, olda, ordo, rado, revado, rodo, rodeo, verda, volado.

## *Solvo por 'Beletraj Anagramoj'*

1. Sten Johansson, 2. Marjorie Boulton, 3. Baldur Ragnarsson, 4. Reto Rossetti, 5. Albert Goodheir, 6. Claude Piron, 7. Jean Forge, 8. Jorge Camacho, 9. Hilda Dresen, 10. Tibor Sekelj.

***La Blanka Rozo*** estas la revuo de la Federacio Esperantista de Jorkŝiro. Ĝi aperas trifoje jare: jarabono £6.00. **Redaktoro:** Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF. Tel. 01642-82 76 79, rete: p.warren47@hotmail.co.uk. **Federacia Prezidanto:** Jack Warren. **Protokola Sekretario:** Gillian Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ. **Kasisto:** Angus Wilkinson, 59 Cross Hills Lane, Selby Y08 4RU. Tel. 01757 210375, rete: angus.wilkinson@sky.com .